NIA PONTO

Grupo Esperantista
Barrencalle Barrena, 7- 1ª dekstre
E-48005-BILBAO (Hispanio)
Redaktas: J.Miguel García Iturrioz (tepgaitj@lg.ehu.es)
Kunven-tago: Vendredo (7,30-9 h.)
☎ 34-944.164.492
☎ portebla: 34-658.709.087
jesusmiguel.garcia@ehu.es
TTT-ejo: http://www.geocities.com/esperantobilbao

Jar-kotizoj: Normala: 20 ∈. Speciala: 15 ∈. Familia: 35 ∈.
BBK-konto: 2095-0141-41-2218001550

MARTO/APRILO 2008 **Nro. 74 (2/08)**

ASAMBLEA GENERAL ANUAL

Por la presente, y según exigen sus estatutos, se convoca la asamblea general ordinaria del Grupo Esperantista de Bilbao para el próximo viernes 16 de mayo, a las 19,30 h., en su sede de Barrencalle Barrena, 7-1º Dcha., con el siguiente

Orden del día:

1. Lectura y aprobación, si procede, del acta de la asamblea general anterior.

2. Aprobación, si procede, del resumen de gastos e ingresos correspondiente al año 2007.

3. Aprobación, si procede, del presupuesto para el año 2008.

4. Informaciones varias por parte de la junta directiva.

5. Ruegos y preguntas.

Dada la escasa asistencia habida en la anterior asamblea general, hacemos un llamamiento a todos los socios para que acudan a la de este año y, de esa manera, contribuyan al mantenimiento del Grupo.

(Artikolo aperinta en "La Ondo de Esperanto" –aprilo 2008- subskribita de la bilbaoano Iñaki Vélez)

Ne handikapo, sed atuto.

Ĉiam mirigis min tiom da tempo-perdantoj en Esperantujo, tiom da polemikuloj pri negravaj aŭ malprioritataj temoj, ekzemple tiuj ple(n)dantaj pri la neceso reformi la Esperanto-alfabeton ĉar enhavanta ĉapelitajn literojn, tiuj, por kelkaj, tiom problemigaj literoj, tiom malfaciligantaj la "progreson de la lingvo"... tiom ĝenaj definitive.

Certe nia originala, specifa alfabeto iom tiklis nian paciencon: aĉetonte tajpilon mi devis iom pli butikumi ĝis trovi tiun kun Esperanto-supersignoj; akirante komputilon mi ne tuj povis klaki Esperant-lingve, tamen ne tro da tempo pasis ĝis kiam mi sukcesis akiri (senpage) taŭgan programeton por tion fari senprobleme; eldonante Esperantaĵojn, kelkfoje estis necesa provizi la presiston per la necesaj Esperanto-litertipoj (kiuj facile estis atingeblaj senpage), ktp.

Tamen, tion kion kelkaj konsiderus handikapo, niaj ĉapelitaj literoj, mi opinias aldona valoraĵo, ĉar alloga identiga specifaĵo, distingilo, precipe nuntempe en epoko tutmondiga, maldiferenciga. Oh, jes, mi scias, Esperanto ĉar internacia lingvo kia ĝi estas, jam sufiĉe unikas, sed bone, lingva komunumo — ankaŭ la Esperanta — bezonas tiajn identigilojn, krom evidente, niajn jam tradiciajn (stelo, flago, ktp).

Tiaj distingigiloj-identigiloj ekzistas ankaŭ ĉe naciaj lingvoj. Ekzemple, la litero "ñ", nur ekzistanta en la hispana (mia naci-lingvo), dum jaroj "ĝenis" nin—en tiu ĉi diĝita epoko kie la komputikajn programojn superregas sensupersigna lingvo kia la angla—printiloj "rifuzis" ĝin presi, retadresoj malakceptis ĝin (ĝis antaŭ nur kelkaj monatoj!), ktp... kaj neniam mi aŭdis plendojn pri la neceso ĝin forigi, anstataŭigi, kiel ĉe esperantistoj pri siaj jam pli ol centjaraj ĉapelitaj literoj. Kontraŭe, la litero "ñ" fariĝis en Hispanio vera simbolo de la hispana lingvo kaj de la kulturo, kiu per ĝi esprimiĝas; ne maloftas vidi ĝin (laŭ diversaj grafikaj aranĝoj) kiel simbolon de oficialaj kulturaj aranĝoj — kelkfoje kiel simbolon de la lando mem — ĉe popularaj kulturaj produktoj (ekzemple, kompilaĵoj de hispanlingvaj muzikaĵoj, ...), sur T-ĉemizoj, ktp. Ekzemple: la registara institucio kiu okupiĝas pri la diskonigado internacie de la hispana lingvo kaj kulturo ("Instituto Cervantes") enhavas ĉi-literon (pli ekzakte ties supersignon).

Do, kial ne uzi unu el niaj "pure" Esperantaj (ĉar ekzistantaj nur en Esperanto) supersignataj literoj, la "ĉ" (tiu —kun la "ĝ"— plej ofta), kiel unu plian identigilondistingilon (ĉi-kaze malformalan!) de nia lingva komunumo? Literoj tiel akre diskutitaj kaj samtempe tiel pasie defenditaj en Esperantujo jam fariĝis atuto de nia komunuma historio, do, kial ne uzi ilin blazone? La grafikan aranĝon, kiun vi vidas apud ĉi teksto, mi trovis unuafoje en *Boletín* (N-ro. 324, jaro 1996) de HEF (fakte nur la centran parton, ĉar la flankan tekston mi aldonis poste); la tuton mi trovas amuza kaj originala. Aldone ĝi povas havi tre interesajn "alternativojn" nur anstataŭante la "cilindran" ĉapelon per alia vakera, rusa (tiu cilindra el felo), turbano, ĉinaindoĉina, ktp...; pensu pri ili sur T-ĉemizoj de respektive usonano, ruso, arabo, ĉino, ktp, tiel informante pri la deveno de tiu esperantista. Amuza ludo!

Iñaki Vélez (Hispanio)

NUEVAS CUOTAS PARA EL AÑO 2008.

Os recordamos que, en la Asamblea General del año pasado, se aprobó un pequeño incremento de las cuotas anuales de socio para este año 2008, así que, a partir del 1 de enero, éstas son:

Cuota normal: 20,00 euros anuales.
Cuota reducida: 15,00 euros anuales.
Cuota familiar: 35,00 euros anuales.

Para facilitar el cobro, a aquéllos que aun no lo hayan hecho, les rogamos que nos hagan llegar un número de cuenta en la BBK y así, se podrán despreocupar de este pago anual pues nosotros mismos lo tramitaremos.

SOMERVOJAĜOJ.

Kelkaj membroj de nia Grupo jam aliĝis al diversaj renkontiĝoj por la venonta somero. Tiel, kelkaj el ili veturos per aŭtomobilo al Kuenko por partopreni la hispanan kongreson. Tre bela urbo kaj grava kunveno en kiu, inter aliaj aferoj, oni diskutos pri la situacio de HEF kaj ĝia estraro, ĉar post la lastaj demisioj, oni elektos tute novan estraron.

Aliaj jam planis viziton al Roterdamo (Nederlando) por partopreni la ĉi-jaran Universalan Kongreson de UEA.

Tiu, kiu deziros pliajn informojn pri tiuj aŭ pri aliaj renkontiĝoj, simple demandu ĉe nia Grupejo.

NOVAJ KURSOJ.

Post kelkaj jaroj sen E-kursoj en nia sidejo, ĉi-jare ni planas organizi ilin denove kaj altiri gejunulojn al Esperantio.

Por tio, estas bezonata via helpo, kiu povas alveni, precipe, per propagando inter viaj konatuloj, familianoj, k.t.p.

Kiel kutime, la elementa kurso ekos je la komenco de oktobro kaj finos ĉirkaŭ marto aŭ aprilo; klasoj okazos unu tagon semajne, po unu horo kaj duono.



HEF-Oficejo.

La estraro de HEF deĵoras, persone, lunde inter la 17,30 kaj la 20,00 horo. Dum aliaj tagoj kaj horoj vi povas telefoni al 91 446 80 79 (aŭtomata respondilo) aŭ kontakti rete: admin@esperanto.es, sed atendu ĉar vi ricevos la respondon la sekvontan lundon.

FEDERACION ESPAÑOLA DE ESPERANTO

Cupón de la O.N.C.E. dedicado a Zamenhof.



ONCE (la Hispana Asocio por Blinduloj) akceptis la peton de Hispana Esperanto-Federacio kaj eldonos kuponon dediĉita al Zamenhof. Ĝi estos lotita la sabaton 17-an de majo.

(Madrida E-Liceo. 20/02/2008)

Nova librotenisto de HEF.

Post la demisio de Pedro Garrote, la HEF-Estraro akceptis (kunveno 2008-02-25) la sinproponon de Raúl Martínez Anguita kiel nova librotenisto. Li loĝas en Ciudad Real kaj estas profesie librotenisto. Li estos nova estrarano post la Ĝenerala Kunveno de Kuenko, kie la membraro ratifos lian nomumon. La Estraro dankas al P. Garrote lian laboron dum 12 jaroj.
Lupe Sanz, HEF- Viceprezidantino

(HEF. 06/03/2008)

MADRIDA MUZIKBANDO KANTAS EN ESPERANTO.

Pere de http://esperantomuziko.blogspot.com/ ni ekscias pri madrida muzikbando, kiu havas unu kanton en esperanto. Ili nomiĝas "Tupelopone"
http://profile.myspace.com/index.cfm?fuseaction=user.viewprofile&friendid=239499446

Estas kelkaj frazoj en esperanto en la prezento. Krome, ili asertas ke "tupelopone" estas esperanta vorto (!?): *La palabra TUPELOPONE es la forma adverbial del verbo "tupeloponi" (en la lengua internacional esperanto), cuya principal acepción, aunque no la única, es "flipar con el pelo de alguien". Si bien es cierto que también se puede flipar con la ausencia de pelo, aunque en esos casos se suele utilizar, preferentemente, el verbo "senharaponi".*

(Madrida E-Liceo. Aprilo 2008)

Esperanto-sekcio en biblioteko de gimnaziejo de estepona.

En la paĝo de la Biblioteko de Instituto de Enseñanza Secundaria "Mar de Alborán", de Estepona (Málaga), aperas detala informo pri la Esperanto-Sekcio inaŭgurita pasintfebruare en la biblioteko de tiu instituto.

Aperas listo de la libroj donacitaj far la Malaga E-Asocio, kaj ligiloj al la Vortaro de de Diego, al HEF, al Lernu.net kaj al la malaga asocio:http://maralboran.org/biblio/

(Darío Rodríguez. 17/04/2008)

KURSO DE ESPERANTO EN LA ASTURA.

Oni anoncas en kurson de Esperanto uzante la asturan: http://gauzonia.info/spip.php?article226
Unua leciono: http://gauzonia.info/spip.php?article235

¿Qué ye l'Esperanto? Clases d'Esperanto n'asturianu L'Esperanto (o Esperanto, sin artículu) ye una llingua ausiliar artificial que creó'l médicu polacu Lluis Zamenhof en 1887 en ficies de facela idioma universal. Diolu a conocer nel so llibru "Lingvo internacia" (Llingua internacional). Esti llibru firmólu Zamenhof como Doktoro Esperanto ("el doctor qu'espera"), y esti alcuñu acabó dando nome a la llingua Esperanto básase nunes normes mui fáciles y regulares y nun vocabulario tomáu de delles de les llingües más falaes: de les romances coyó del italianu, francés, español..., de les xermániques del alemán y l'inglés... Amén d'otres.

(Toño del Barrio. 22/04/2008)

E-KONGRESOJ POR 2008.

14/16 marto. Benicassim (Castellón). Iberia Renkontiĝo (IRO-08).

03/06 jul. Cuenca. Kongreso de Hispana Esperanto-Federacio.

19/26 jul. Rotterdam. 93a Universala Kongreso.

26 jul/2 aŭg. Szombathely (Hungario). IJK, Internacia Junulara Kongreso de TEJO.





Kiel ĉiam, pliaj informoj pri kongresoj kaj aliaj renkontiĝoj, ĉe nia Grup-ejo. Ankaŭ informoj pri vojaĝeblecoj kaj kunvojaĝantoj.

TRA LA MONDO ...

EU financos peresperantan tradukprojekton de infanlibroj.

La Eŭropa Komisiono aprobis tradukprojekton de infanlibroj, en kiu Esperanto rolas kiel pontolingvo. EU financos per 64.000 eŭroj la projekton, en kiu infanlibroj pere de Esperanto estos tradukitaj inter la bengala, itala, slovena kaj kroata lingvoj, kaj poste distribuitaj en elementaj lernejoj.

La eldonprojekto, kiun ellaboris por Kroata Esperanto-Ligo Zlatko Tišljar, kaj en kiu partoprenos kiel partneroj Edistudio el Pisa (Italio), Inter-kulturo el Maribor (Slovenio) kaj barata eldonasocio Samatat Siksha Â Samatat Prakashan el Kalkato estis aprobita de kulturfonduso de Eŭropa Komisiono (EACEA Â Culture).

EU financos la projekton per 64.000 eŭroj. La projekto antaŭvidas ke ĉiuj partneroj (itala, slovena, kroata kaj barata) tradukos el siaj lingvoj unu infanlibron de sia literaturo al Esperanto. Poste la barata partnero plutradukos la tri eŭropajn librojn el Esperanto en la bengalan, kaj la tri eŭropaj partneroj tradukos la baratan libron ĉiu al sia nacia lingvo.

Post kiam ĉiuj eldonos la librojn, oni distribuos ilin en elementaj lernejoj de siaj urboj kaj organizos legokonkurson inter la infanoj. La plej bonaj verkoj de la infanoj pri libro legita kaj apartenanta al alikontinenta kulturo estos premiitaj. Pri la tuto la eldonistoj daŭre informados la gazetaron, radion kaj televidon.

La barata partnero kunlaboras kun la prezidanto de UEA, Probal Dasgupta. La projekto estos efektivigata inter majo 2008 kaj majo 2010. Tiu estas la unua tiaspeca interkultura projekto uzanta Esperanton, kiun finance subtenas Eŭropa Komisiono.

Raportis Zlatko Tisxljar en http://www.liberafolio.org/2008/eubaratalibro

(Informis: Miguel Gutiérrez Adúriz. 17/02/2008)

Ĉu denove U.K. en Kubo?

La Ĝenerala Direktoro de UEA, Osmo Buller, ĵus revenis el Kubo, kie li esploris la eblecon okazigi en Havano la Universalan Kongreson 2010. Ni rememorigas pri tio, ke lastfoje okazis UK en Kubo en la jaro 1990.

(Darío Rodríguez. 24/02/2008)

La Papo denove salutis en Esperanto.

La Papo Benedikto la 16a denove salutis en Esperanto okaze de la Pasko de la Resurekto:

http://www.ikue.org/pasko2008/pasko2008_b16esp.mp3
http://www.ikue.org/pasko2008/pasko2008.htm

(Darío Rodríguez. 24/03/2008)

Du novaj aŭtomataj tradukiloj al Esperanto.

Laŭlonge de la jaro 2007 la Universitata Instituto pri Aplikita Lingvistiko, ligita al la universitato Pompeu Fabra, en Barcelono, laboris super du aŭtomataj tradukiloj el la kataluna kaj la hispana lingvoj en Esperanton. La tradukilojn mendis la entrepreno ABC-Enciklopedioj antaŭ unu jaro, kaj en tiu periodo grupo de la Instituto, kun subteno de la Departemento pri Lingvoj kaj Komputadaj Sistemoj de la Universitato de Alakanto, kaj de Kataluna Esperanto-Asocio, disvolvis unuan version de la du tradukiloj.

La tradukiloj estas bazitaj sur la teknologio Apertium de la Universitato de Alakanto. Ĝi konsistas en aro da rimedoj por malprofunda tradukado, taŭga por proksimaj lingvoj. Tio signifas, ke la tradukiloj bazitaj sur ĝi ne faras ĝisfundan sintaksan analizon de la origina teksto – kio estas tre malfacila en la nuna stato de la aŭtomat-tradukada teknologio –, sed aplikas aliajn teknikojn kiuj produktas kontentigajn rezultojn tradukante inter lingvoj strukture similaj, ekz. inter du latinidaj lingvoj.

El komputika vidpunkto, la program-kodo estas libera kaj funkcias sur la operaciumo Linukso. Tiel, do, kompetenta fakulo povas libere aliri la tekston de la programoj kaj eventuale modifi ĝin por plibonigi aŭ adapti al specifaj bezonoj.

La libera programado fariĝis en la lasta jardeko eksterordinara rimedo por krei potencajn kaj senpagajn programojn por la plej diversaj bezonoj, danke al la kunlaboro de sennombraj disaj teamoj de fakuloj tra la tuta mondo. Tial malferma sistemo kiel Apertium ŝajnas promesplena investo, kaj la disvolvado de aŭtomataj tradukiloj per ĝi – almenaŭ el la latinidaj lingvoj en esperanton – ŝajnas trafa veto. Fakte, multitas la nombro de lingvoparoj por kiuj Apertium estas uzata: nuntempe oni nombras tridekon.

Konkrete, la kataluna vortaro de la aŭtomata tradukilo atingas 15000 vortojn, ĉefe komun-uzajn, dum la hispana vortaro superas 12000. Por aŭtomata tradukilo por ĝeneralaj tekstoj tio ne atingas la dezirindan minimumon de 20000, sekve necesas plu evoluigi la tradukilojn, kvankam, laŭ la kontroloj sur gazetaraj tekstaroj katalun- kaj hispanlingvaj, kun po unu miliono da vortoj (t.e. ĉ. po 2500 paĝoj da teksto), preskaŭ 90% de la vortoj apartenis al la vortaro de la tradukiloj.

Ankaŭ el la ne-leksika vidpunkto la tradukiloj estas ankoraŭ nematuraj – ĉefe tiu el la hispana, por kiu la malfruigo de la livero de dulingva vortaro tre mallongigis la tempon de disvolvado de la modulo –, tamen la rezultoj montriĝas tre kontentigaj kaj esperplenaj laŭ la blogo de Artur Trzewik, respondeculo de la redaktilo Esperantilo.

Post streĉa unu-jara laboro venas fazo, en kiu la tradukiloj estis instalitaj en la oficiala TTT-ejo de la projekto Apertium, kiun oni tradukis en Esperanton. La sekva paŝo estos la transpreno de la projekto fare de teamo de Kataluna Esperanto-Asocio kaj ties testado kaj evoluigo fare de komputistoj kaj lingvistoj de la asocio.

Eventuale, en 2009 oni entreprenos la starigon de tradukiloj en la inversaj direktoj. Entute, la revo de la teamo estus la disvolvado de reto de dulingvaj aŭtomataj tradukiloj inter esperanto kaj naciaj lingvoj, tradukiloj kiuj plifaciligus la efektivan uzadon de esperanto kiel pontolingvo en la reto.

(artikolo de Kataluna Esperanto-Asocio en Libera Folio:
http://www.liberafolio.org/2008/komputraduko.

Adreso de la tradukilo: http://xixona.dlsi.ua.es/apertium-unstable/es/

(Darío Rodríguez. 27/04/2008)

GRANDIOZA NOVAĴO.

Al Eŭropa Esperanto-Unio, Eŭropa Komisiono (Eŭropa Buroo EACEA: Civitanaj aktivecoj) aprobis la peton 80% financi la funkciajn kostojn, oficejon en Bruselo kaj salajron de unu oficisto! La aprobita sumo estas 55.000 eŭroj por la jaro 2008. Tio estas rezulto de serioza laboro de la nuna estraro kaj la oficistino Maja Tišljar. EEU estas unu el 36 eŭropnivelaj organizajhoj kiu ricevis subvencion el inter pli ol 300 kiuj petis tion.

(Zlatko Tišljar. 24/04/2008. Pere de Darío Rodríguez)

RETAN TELEVIDON ESPERANTLINGVE.

Por kiu ne scias, ekzistas www.itvc.pl

Jorge Tarducci, 2008-05-03

SPRITAĴO.

Junulo pasigis feriojn en vilao ĉe la maro.
Ĝia mastro havis kvin belajn filinojn.
Post kelkaj monatoj li sendis al la junulo telegramon: "Vi trompis mian filinon. Se vi estas ĝentelmano, vi devas edziĝi kun ŝi."
- La trompinto respondis per telegramo: "Jes, mi konsentas edziĝi, sed kun kiu filino?"

(Prenita el TTT-ejo de "Lernu")

Al la fiŝo ne instruu naĝarton.

Amiko estas kara, sed mi mem estas pli kara.

(Zamenhofa proverbaro)